**Luminesk' - la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio**
**28-a de decembro 2025 ĝis 3-a de januaro 2026**
**Bingen am Rhein**

**Dua informilo**

---

Jam de multaj jaroj ie en Germanio okazas la jarfina renkontiĝo Luminesk', kiun organizas Germana Esperanto-Asocio. Proksimiĝas la limdato 31-a de oktobro, post kiu aliĝo al ĝi fariĝos iom pli kosta (tamen indas mencii ke la kotizoj ĉi-foje estas konsiderinde pli malaltaj ol pasintan jaron). Alvena tago estos dimanĉo, la 28-a de decembro, forira tago sabato, la 3-a de januaro.

**Kunvenejo**

Bingen estas mezgranda urbo (25.384 enloĝantoj) en sudokcidenta Germanio, ĉe la kunfluo de la riveroj Rejno kaj Nahe. La grandurboj Mainz, Wiesbaden kaj Frankfurt estas proksimaj. Bingen situas ĉe la komenco de la meza, malvasta Rejna valo, apud la malprofundaĵo «Binger Loch», kiu iam endanĝerigis la ŝipveturadon. La panoramon de la valo kun la t.n. «Musa Turo» sur insuleto en la Rejno vi povos ĉiun tagon vidi el nia kunvenejo. La plej konata historia figuro de la urbo estas la saĝa monaĥino Hildegard von Bingen (1098-1179), kiu i.a. verkis librojn pri teologio, naturscienco kaj kuracado, komponis pli ol 70 muzikaĵojn kaj eĉ kreis sekretan lingvon; detalojn legu en Vikipedio. Pluraj lokoj en la urbo memorigas pri ŝi.



Panorama rigardo el la junulargastejo / © Ulrich Brandenburg

Hodiaŭ Bingen estas turisma centro meze de vinkultura regiono. Ni kunvenos en la modernigita junulargastejo (Herterstraße 51, 55411 Bingen), kiu troviĝas ĉe la deklivo iom super la fervoja stacio Bingen Hauptbahnhof en la urboparto Bingerbrück, piede atingebla de la stacio en 15 minutoj. Ni estos la sola grupo tiutempe kaj disponos pri unu- kaj dulitaj ĉambroj kun banĉambroj. La kotizo kiel kutime enhavas ĉiujn manĝojn kaj silvestran bufedon. Vespere en la domo funkcias agrabla trinkejo.

**Programo**

Validas la ĝenerala programskemo trovebla en la reto. Ne ĉiuj ĝiaj partoj jam estas definitive fiksitaj. Certas ke en la kadro de Luminesk’ denove prelegos Amri Wandel, ĉi-foje pri la historio de spacveturado. Kristin Tytgat gvidos paroligan kurson. Certe ni ankaŭ pritraktos la temon Hildegard von Bingen. Sub gvido de Martina Sachs-Bockelmann ni gustumos vinojn el la regiono Nahe. Christoph Frank prezentos pupteatraĵon por plenkreskuloj („Münchhausen“). Unu vesperon ni denove dediĉos al la loko de la venonta Universala Kongreso, do al Aŭstrio kaj Graz. Kaj la semajnon kun ni denove pasigos Ankie kaj Nanne (« Kajto ») kun ateliero pri kantado kaj silvestra koncerto.

**Ekskursoj**

Kiel en Norderney kaj Bielefeld ni denove planas urbogvidadon komence de la semajno por ĉiuj partoprenantoj. La 1-an de januaro okazos la kutima novjara promenado. Ĉefa ekskursa tago estos la 30-a de decembro. Por tiu tago ni planas duontagajn ekskursojn al proksimaj celoj laŭlonge de la Rejno, facile atingeblaj per fervojo aŭ pramŝipo. Ni konsideras Mainz, Rüdesheim kaj Bacharach. Kiu el vi posedas la tutgermanian bileton por regiona trafiko („Deutschland-Ticket“), nepre kunportu ĝin. Pliajn detalojn pri programo kaj ekskursoj vi trovos en la tria informilo, kiun ni dissendos al aliĝintoj.






Membroj de la organiza teamo en la centro de Bingen - Ĉefstrato en apuda urbeto Bacharach / © Ulrich Brandenburg

**Ĉu vi jam aliĝis? Se ne, faru baldaŭ!**

Plej facile eblas aliĝi per la retpaĝo de Germana Esperanto-Asocio (www.esperanto.de). Se vi aliĝas antaŭ la 31-a de oktobro, vi pagos 480 € por restado en dulita, 550 € en unulita ĉambro (unulitaj ĉambroj jam rapide forvendiĝas!). Ekde la 1-a de novembro la kotizoj altiĝos al 530 respektive 600 €. Partoprenantoj el Germanio, kiuj ne estas ordinaraj membroj de GEA, krompagos 30 €. Aliĝo validas post ricevo de antaŭpago (minimume 50 €). Pagu al la konto de Germana Esperanto-Asocio, IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis (BIC: HELADEF1ERB) aŭ al la UEA-konto geaa-n, pagcelo Luminesk’ 2025/2026 kaj via nomo. Kaj ne forgesu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ komenco de la renkontiĝo.
Ĝis revido en Bingen!

*La organiza teamo: Andreas Diemel, Barbara kaj Ulrich Brandenburg*